


Numero: 333.
Februaro 2020.

28-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Februaro

La lingvolernado

Ĝi estas la plej kruta monato de la jaro. Verdire la nuna februaro estos pli longa je unu tago, ĉar estas superjaro. Ĝi estas en ĉiu kvara jaro. Tiel ankaŭ la jaro estos pli longa.

Ni esperantistoj havos pli multe da tempo por disvastigi nian karan lingvon.

Ĉu ni vere faras ĉion por ke Esperanto disvastiĝu en la tuta mondo, aŭ ni nur atendas nenionfarante kaj atendas je miraklo.

La malamikoj de Esperanto fanfaronas dirante: super la zamenhofa lingvo forflugis la tempo. La angla lingvo venkis sur ĉiu tereno: en la internaciaj rilatoj la angla lingvo estas akceptita.

Vere ĉie oni uzas tiun ĉi lingvon kvazaŭ la demando de la internacia lingvo estus decidita.

Malgraŭ tio mi diras, por Esperanto estas ŝanco kaj ĝi povos fariĝi la dua lingvo de la homaro.

La angla lingvo apartenas al nacio kaj laŭ mi dum ĝia vasta uzado ĝi kripliĝis kaj se ĝi restos la unusola helplingvo, ĝi fariĝos tute kripla. Ĝi perdos sian praan karakteron kaj mem la denaskuloj devos lerni ĝin, se ili deziras komuniki kun la eksterlandanoj.

Kompreneble nun mi ne asertas, ke la angla lingvo formortos. Ĝi ankoraŭ longe estos la komunikilo de multaj homoj.

Tamen estus pli laŭdinde, se la homaro havus sendependan, neŭtralan, facile kaj rapide ellerneblan duan lingvon.

Ni skribu sur nian flagon: Esperanto por defendi la belan, nacian, anglan lingvon!

Ĝi estas nur mia opinio. Vi povas kontraŭdiri al mi. Eĉ mi ĝojegus, se ankaŭ vi skribus vian sinceran opinion.

Bona diskuto povas esti rezulta, kaj ĝi helpas solvi la problemojn.

Inter la kanoj de la laĝeto rano decidis lerni la lingvon de la cikonio. Sed ĝi ne sciis, kiel komenci la lernadon.

Ĝi demandis la tie flugantan hirundon:

— Hirundo kara, mi deziras ellerni la lingvon de la cikonio. Bonvolu helpi min! Kiel mi komencu la lernadon?

La hirundo longe pensadis kaj fine ĝi elbuŝigis:

— Mi bone konas la sinjoron Cikonion. En la vilaĝo mi ofte babiladas kun ĝi. Se vi volas, mi volontes demandos, ĉu ĝi estus via lingvoinstruisto. Laŭ mi ĉi lingvon nur mem la cikonio scias perfekte.

— Bonvolu demandi la cikonion! — ĝojegis la rano kaj ĝi malpacience atendis la respondon.

Ankoraŭ ĉi-tage reflugis la hirundo al la laĝeto kaj ĝi diris gaje:

— La sinjoro Cikonio mesaĝas, volontes ĝi fariĝos via lingvoinstruisto. Morgaŭ frumatene iru al ĝia nesto kaj vi preparolos ĉion detale. Ĝi havas internacian diplomon pri la lingvoinstruado.

La rano dankis la helpon.

Alitage ĝi frumatene rapidis al la nesto de la cikonio.

— Vi alvenis ĝustatempe — diris la cikonio. — Mi prefere instruas en la matenaj horoj, ĉar tiutempe ankoraŭ mia kropo estas malplena. Tiel la sonoj klare eliĝas tra mia beko. Bonvolu konvinkiĝi pri ĝi, kara nova lernanto! — la cikonio malfermis sian bekon.

La rano nesuspektante danĝeron iris al la beko. Kiam ĝi estis tute proksime, la cikonio manĝegis ĝin kaj kontente diris:

— Ene vi povos lerni pli rezulte kaj krome vi povos loĝi en studenthotelo. Vi ne devos hejmeniri ĉiutage al la laĝeto. Mi garantias al vi, ene vi perfekte ellernos la lingvon de la cikonioj.

— Redaktanto —

— Ŝaŝa —



Vojaĝo al la lando de la misteroj

— unua ĉapitro —

Nia marŝipo albordiĝis ĉe nekonata insulo, kies nomo ne estas legebla eĉ sur la plej detalaj mapoj.

Pri tiu ĉi insulo ne aŭdis eĉ la kapitano de nia marŝipo.

Efektive neniu sciis, kie ni estas.

La kapitano provis fari kontakton kun la marŝipa kompanio kaj peti klarigon pri tiu ĉi insulo. Li atendis longe, sed li ne ricevis respondon.

Estis permesite, ke ni vizitu la insulon.

— Ni restos tie ĉi unu tagon. Dum tiu oni povos promeni sur la insulo - diris la kapitano, kaj ni ekiris malkaŝi tiun ĉi belegan parton de la terĝlobo.

Mi elŝipiĝis kun Elinjo. La marbordo estis nekutime belega. Ni agrable paŝadis sur la velura sablo direktante niajn paŝojn al la proksima arbareto. La distanco de la maro ĝis la arbareto estis je ducent aŭ tricent metroj.



Elinjo iomete ektimis, kiam mi proponis al ŝi eniri la arbaron.

— Eble tie estas sovaĝbestoj — ŝi diris kaj deziris reiri al la maro, kie ŝi sentis sin sekure.

— Ne estus infano — mi diris. — Ĝi estas malgranda insulo kaj tie ĉi ne estas sovaĝbestoj. Ni rigardos, kio estas ene.

Vole nevole Elinjo sekvis min. En la arbaro estis obskuro kaj humido. El inter la arboj aŭdiĝis strangaj sonoj. Ili ne estis timigaj. La sonoj vekis nian interesiĝon ekscii, de kie venas tiu ĉi strangaĵo.

Duone ĝi estis ia ĉiela muziko, duone ĝi estis tenta homa parolo. Sed ne eblis scii, kie estas ĝia fonto. El ĉiuj direktoj ĝi estis aŭdebla.

— Stranga sono — mi diris. — Ni serĉu ĝian fonton! Eble sur la insulo estas inteligentaj estaĵoj.

— Ne estus pli bone reiri al la ŝipo? — provadis konvinki min Elinjo.

Mi silentis kaj pluiris en la arbaro.

Mi aŭdis la rapidan spiradon de Elinjo. Certe ŝi tre timis, sed ne kuraĝis tion konfesi al mi.

Ni iris kaj iris, sed neniam ni atingis la strangan sonon.

En iu momento mi sentis, ke ĝi devenas de la supro de arboj kaj en la alia mi aŭdis el sub la tero.

Nun jam ankaŭ mi estis konfuzita kaj mi rigardis al mia kunulino nenion komprenante.

— De kie vi aŭdas la strangan sonon? — mi demandis scivole.

Elinjo rigardis al mi per siaj azurbluaj okuloj, sed ŝi diris nenion.



Mi devis konstati, ke ŝi eĉ timas ekparoli. Eble ŝia tuta korpo tremas.

Mi ekkonsolis ŝin:

— Ne timu! Tie ĉi ne povas okazi malbono. Ĝi estas malgranda insulo kaj baldaŭ ni vojaĝos plu!

Ankaŭ min nervozigis, ke mi ne vidas la aliajn pasaĝerojn de la ŝipo, kvankam preskaŭ ili ĉiuj elŝipiĝis. Kie ili estas? La insulo ne estas tro granda. Ĉi tie ne povas malaperi pli ol tricent homoj. Antaŭ nelonge ni ankoraŭ amasiĝis sur la marbordo. Eble Elinjo pravas, ni devus reiri al la ŝipo.

Mi ne scias kial, sed mi deziris montri al mia kunulino, ke mi estas kuraĝulo.

La stranga sono ne ĉesis, eĉ ĝi plifortiĝis. El ĉiuj direktoj mi aŭdis ĝin.

Mi vidis, ke ĝi ĉagrenis ankaŭ ŝin. Elinjo sekvis min, kiel timema hundido.

Krom tio tiu ĉi arbaro estis kutima. Ĉie estis grandaj arboj kaj densaj arbustoj.

Mi ĵetis rigardon al mia brakhorloĝo kaj mi konstatis, ni estas en la arbaro ne pli ol kvin minutoj, tamen mi sentis, ke jam pasis horoj.

Neatendite sur la branĉo de iu arbo Elinjo ekvidis malgrandan bluan birdon. Ĝi sidis tie senmove, kvazaŭ ĝi estintus el plastiko.

— Rigardu tiun interesan, bluan birdeton! — ŝi montris supren al la branĉo.

(daŭrigota)

— Apáti Kovács Béla —



Poezio

Mikaelo Bronŝtejn

Jam, kiam mi estiĝos
Tute laca, tre kaduka, –
Tiam iam okupiĝos
Nure pri labor' traduka.

Kiam haroj perdos denson,
Montros grizon surtempian,
Tiam ĉiun fremdan penson
Mi tradukos, kvazaŭ mian.

La propra opinio
Estingiĝos sinofere,
Kaj degelos mia mio
Eĉ surpapere.

Jam, kiam mi kutimos
En la plato serĉi fundon,
Volnevole ekestimos
Ŝtelon, flaton, monabundon,

Kiam nur iama gloro
Inercie antaŭkuros,
Mi en iu trista horo
Mian gorĝon, certe, ŝnuros.

Se donus tian sorton
Mia sorta vivovojo, –
Mi preferas ĝojan morton
Al la morta ĝojo.

Jam, kiam dum izolo
Mornaj pensoj min sieĝos,
Tiam iam mi en folo
La amikojn forajn preĝos.

Ja hela rememoro
Tiam tuŝos min ekstaze –
Doloreto, ne doloro,
Kvazaŭ vangon vundis raze.

Se la esto jam ne festo,
Nur la griza emocio, –
Mia fora ul' favora
Savu min de tio.



Mikaelo Bronŝtejn



Mi povas sendi al vi neĝon,
Maltunan, lanugan,
Ĉielon puran, kiel preĝon,
Profundan, sennuban.
Fieras frostoj kun obstino
Hieraaŭ, hodiaŭ...
Ĉu vi ne aŭdas, amatino:
– Adiaŭ!

Mi povas sendi al vi sunon
El ora glacio.
Vintrego vartas mian nunon
Jam ekster konscio.
De la poluso venas vento
Kaj frapas la vitron.
Ne povas venki eĉ prudento
La vintron.

Kaj restas ĝojo ununura:
Sub vido envia
Ĉiele malaperas spuro
De l' bruo avia.
Ankoraŭ ion mi atendas...
En bluo malplena
Senmovo blanka sin etendas.
– Apenaŭ!



Por infanoj



Daŭriga rakonto el la : `Mirinda renkonto`

Estis bela decembra vespero. Aero pleniĝs de diversaj odoroj. Surstrate amaso da homoj gajiĝis.

Homoj preparis sin por festi Novan Jaron.

Je la oka vespere forlasis tri ursetoj la domon kune kun Petro. Ili renkontiĝis kun najbaro kiu ŝanĝis ilian planon por ĉi tiu solena vespero.

Nome, Petro decidis ke ili piediru al la domo de tiu najbaro. Li klarigis, ke en lia domo homoj festis la naskiĝtagon de sia filo, kaj ke ili estus feliĉaj, se tri ursetoj pligrandigu ilian feston. "Ni vidos" – estis la vortoj de Petro.

La granda pordego estis malfermita. En la domokorto ili ekvidis gajan junulo-grupeton dancantan kaj de tempo al tempo fajfantan laŭ ritmo de la laŭta muziko. Tri ursetoj malŝati tiom fortan muzikbruon. Do, ili flankeniris laŭ la domomuro. Sur la muro tuj aperis ombroj de iliaj grandegaj kapoj.

Tiam unu el knaboj elkuranta el la domo ekkriaĉis. „Kio estas tio! Trikapa monstro!”

Baldaŭ ĉiuj ĉirkaŭiris la triopulojn. Ĉiu scivole rigardis tri allogajn ursetojn.

Dume la nekonata najbaro prezentis sin klarigante al la gastoj pri kio temas. Tri ursoj kaj Petro sidiĝis dum junaj knabinoj alportis al la tri ursoj po tason da mielo kaj teon al Petro.

Petro admire balancas la kapon. Lia rigardo vagas en la ĉambro: nenio mankas. Plaĉa riĉa aspekto de la domo - ekpensis li trankvile. Tiam li ekvidis junulon sidantan en rulseĝo.

„Kiu estas li?”

La najbaro, Tomo respondis iomete emberase "Li estas nia filo Niki. Li estas paralizita ekde sia naskiĝo. Krome li havas aŭtisman. Mi volis lin surprizi, venigi geamikojn al li. Vidu, tiuj knabinoj estas volontuloj kiujn mi venigis helpi min prepari la feston. Same okazis kun tiuj junuloj dancantaj en la domokorto.

Iuj venis post mia peto kaj klarigo, samkiel vin mi petis por plibeligi lian feston per via ĉeesto." klarigis li atente rigardante nin kun zorga vizaĝmieno.

Post momento knabinoj enportis pladojn plenajn da manĝaĵo. Tiom abundeco de frandaĵoj!

Ili ĉiuj gastigis sin kaj kontente dankis al la najbaro Tomo.

„Je sano de via filo Niki!” Ni tostis kun la gepatroj de Niki. Niki ridetis kontente kaj time tuŝis la felon de ursoj. Nia bluĉapulo "Klaŭno" ridigis nin, precipe la povran knabon, Niki.

Je la deka vespere Petro rimarkis, ke ili jam malfruis por partopreni al la novjara aranĝo. Do, ili decidis resti tie kaj gajigi novan amikon, Niki.

Samtempe, en la urboplaco Jana kaj Pavlo havis siajn novjaran programeron. Ili gaje kantis dum Sara elkore aplaŭdis al ili. Larmoj plenigis okulojn de Sara, sed tiuj larmoj estis larmoj de feliĉo.

„ - Amikoj, kial ni ne serĉu niajn amikojn anstataŭ ĉi-tie festi kun urbanoj - proponis Jana tuj post sia kantado. Ili ĉiuj konsentis, kaj ekis serĉado.

Je la duono de ilia vojo al la domo de nekonata najbaro ili surprize renkontiĝis kun unu el la knabinoj el la domo de najbaro Tomo. Ŝi diris serioze: „Mia mastro alsendis min. Viaj geamikoj fartas ĉiuj bone, kaj ĉiuj invitas vin ĉeesti je nia festo honore al Niki.”

„-Bone, ni kuniros al via domo” - ŝi returnis sin kun rideto al Pavlo. Li kuntiris la brovojn sed ekiris konsentite. Atinginte la domon ili tuj renkontiĝis kun Petro.

La tutan nokton ili restis kun familio de Niki. Tiel pasis novjara festo. Ĉiuj kantis kaj dancis, kaj distre amuziĝis.

Okulfrape brilis ĉio, precipe okuloj de Niki. Li estis feliĉa ĉar li ne estis sola kiel li al kutimiĝis dum pasintaj jaroj.

Li estis ege trista. Tial lia patro Tomo, decidis fari al li magion. Kiel li ĝojis!

La geknaboj esprimis dankon al la najbaro Tomo, kiu tre afable ilin kolektis. En aŭroro ni disiĝis.

Ekscita pompo regis survoje al la domo de Sara. Tri ursoj parade marŝadis. Ĉirkaŭ iliaj koloj flirtis diverskoloraj maŝoj, la donacoj de Niki.

Frumatene de la sekva tago venis senditoj de najbaro Tomo por vidi, kiel fartas Sara kaj ŝiaj tri ursoj. Fakte tiuj estis novaj tri amikinoj, helpantinoj dum la Novjara festo ĉe Niki.

Subite hastis poŝtisto portante telegramon al ŝi. Ĉiuj enpanikis ne sciante, kio okazis. Sara nervoze malfermis la ricevitan telegramon legante laŭtvoĉe.

„Pro via sincereco kaj neegoismo mi, Tomo, la patro de Niki, invitas vin ferii tute senpage du semajnojn ĉe marbordo en nia fama vilao „Niki”. Stop! Ni ekiros post du semajnojn...lunde! Bonvenon! Tie ni renkontiĝos!”

Ĉiuj vizaĝoj radiis de ĝojego! Ĉiuj ekridis! Kio sekvos? Bonvolu legi la dŭrigon de la „Mirinda renkonto”!

Verkis Miric Jadranka Zajeĉara E-o klubo –
Serbio la 14 an de Januaro 2020

Karavalo

Karavalo

